

KONTAKTO

numero 155 (1996:5)

SUR LA SPUROJ DE ZARATUŬTRO:

VERO

**ESTAS LA
PLEJA**

BONO

Lernu kun Ulrich
Matthias kiel skribi
AMLETEROJN

Bernard Golden
prezentas kolekton
de **PROVERBOJ
PRI HUNDOJ
KAJ HOMOJ**



| | | |
|--|-----------------------------------|----|
| La malfacila elekto de Niĝerio | Ayo Bamgbose (THE UNESCO COURIER) | 2 |
| Vero estas la pleja bono | Vladimir Ionesov, Rusio | 4 |
| Vaŭ, vaŭ! Proverboj pri mi kaj mia plej bona amiko | Bernard Golden, Hungario | 6 |
| Nomburu: Kiom da hundoj? | Redakcio | 6 |
| Kiel skribi amleterojn | Ulrich Matthias, Germanio | 8 |
| Piratinuoj! | Esperantigis Zoran Ĉirić, Serbio | 10 |
| Konkurso de Pola Radio | E-redakcio de Pola Radio | 11 |
| "Papereto vortas lingvon" | Alberto García Fumero, Kubo | 11 |
| Barbiero | S.N. Mozaffari, Irano | 12 |
| La naiva koalito | Robert Roze, Francio | 13 |
| Kial vir-hundoj levas malantaŭan kruron por urini? | Sok Samnang, Kamboĝo | 14 |
| Tentaklo | | 14 |
| Ŝpini la tempon | Nicolae Macovei, Rumanio | 16 |

KONTAKTO

Dumonata socikultura gazeto de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), eldonata de Universala Esperanto-Asocio (UEA)

Fondita en 1963

N-ro 155 (1996:5), 33-a jarkolekto

ISSN 0023-3692

Legata en 90 landoj

Adreso: UEA, Nieuwe Binnenweg 176

NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando;

☎ +31 10 436 10 44

☎ +31 10 436 17 51

✉ uea@inter.nl.net

Redaktoro: Francisco L. Veuthey

Konstantaj kunlaborantoj:

Irina Aleksejeva (Rusio)

Abel Machado dos Anjos (Brazilo)

Felip Artero i Lozano (Katalunio)

Zoran Ĉirić (Serbio)

Alberto García Fumero (Kubo)

Gbeglo Koffi (Togolando)

Bernard Golden (Hungario)

Claus Günkel (Germanio)

Kizeyidioko Mayinda (Zairio)

Nicolae Macovei (Rumanio)

Ulrich Matthias (Germanio)

Attilio Orellana Rojas (Argentino)

Ōshō-Davies Olúwábùnmí (Niĝerio)

Anna Rachoń (Pollando)

Robert Roze (Francio)

Ūatanabe Kei (Japanio)

Grafika elpretigo: Roy McCoy

Prelegado: Rob Moerbeek

Presado: Grafisch Bedrijf Tuijtel


Facilingvaj artikoloj estas verkitaj en la niveloj tre facila kaj facila, laŭ la vortolisto de KONTAKTO. Tiu lista aperas en la unua numero ĉiujara.

Anonctarifoj:

Tutpaĝa 780 gld., duonpaĝa 430 gld., kvaronpaĝa 240 gld., sesonpaĝa 185 gld., okonpaĝa 130 gld. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Senŝanĝe ripetita anonco (ne anonceto!) en sinsekvaj numeroj rajtas je rabato de 20%. Por movadaj instancoj: 50% rabato. Varbantoj de ekstermovadaj anoncoj ricevas maklerajon de 30% el la prezo de la koncerna anonco. La abontarifoj varias laŭlande. Petu informojn de la supra adreso.

Malfortvidantoj povas ricevi voĉlegitan eldonon senpage. Sendu du 60-minutajn kasedojn al Elise Lauwen, Neerstraat 165, NL-5215 AP 's-Hertogenbosch, Nederlando.

Malfortvidantoj povas ricevi voĉlegitan eldonon senpage. Sendu du 60-minutajn kasedojn al Elise Lauwen, Neerstraat 165, NL-5215 AP 's-Hertogenbosch, Nederlando.



enkonduko

Mi havas bonan novaĵon: unuafoje la nombro de abonon de KONTAKTO superis la magian limon de 2000 (du mil)! Mi mem eble estas la plej mal-kontenta leganto de nia revuo, sed certe ne estas tro granda peko konfesi, ke mi multe ĝojas pro la laŭdoj kaj kuraĝigoj, kiujn sendas aliaj legantoj. Eĉ pli mi ĝojegas pro la rekordo de abonantej. Ankaŭ la kasisto de TEJO ĝojas, ke ĝi eblis dank' al la plimultiĝo de junaj membroj kaj TEJO-patronoj. Bonvenon al la novuloj kaj dankon al vi ĉiuj!

Nun estas tempo pagi la kotizon por 1997. Estas bele, ke en multaj landoj la simpla abono de KONTAKTO por la venonta jaro kostas eĉ malpli ol ĉi-jare. Memoru ankaŭ, ke ĉiuj povas malaltigi la abon-prezon 20% aŭ eĉ 40% farante kolektivajn abonon. Ĉu vi jam proponis tiun eblon al via klubo, kurso, landa sekcio de TEJO aŭ al viaj geamikoj? Ni ne lasu la rekordon transvivi la venontan jaron!

Francis

Ĝenerale disvolviĝantaj nacioj malofte konsideras lingvajn demandojn kiel prioritaton, escepte se la problemoj ekaperas lige kun la efektivigo de kontraŭdiraj lingvaj politikoj. Niĝerio ne estas escepto, kaj ekonomiaj problemoj estas tie popole perceptataj kiel pli proksimaj kaj gravaj ol lingvaj problemoj.

Tamen sociaj, ekonomiaj kaj politikaj renversigoj ekde la sendependiĝo enfokusigis la lingvon kiel kernan faktoron por la socia kaj politika stabileco de la lando. Sekve, demandoj pri lingvo reliefigis en la sesioj de la du Konstituciaj Asembleoj starigitaj por krei novajn konstituciojn, en la nacia debato pri la laborkadro por politika regado, kaj en sinsekvaj konstitucioj ekde 1960.

Kiel la plimulto el la afrikaj landoj, Niĝerio estas plurlingva. Estas preskaŭ 400 lingvoj — ne dialektoj — kaj tri el tiuj lingvoj, haŭsa, igboa kaj joruba, estas parolataj de preskaŭ la duono el la 88,5 milionoj da loĝantoj de la lando. Aldone, la restantaj 10 procentoj de la loĝantaro konsistas el parolantoj de aliaj lingvoj, kiuj tamen scipovas minimume unu el la plej grandaj lingvoj kiel kroman lingvon.

Kvankam la niĝeriaj lingvoj estas ordinare klasifikataj kiel jen majoritataj jen minoritataj lingvoj, tio ĉi estas forte erariga, ĉar proksimaj en ciferoj estas preskaŭ dek gravaj lingvoj, kiuj servas kiel ĉefaj lingvoj de kelkaj el la ŝtatoj. Tiuj lingvoj inkluzivas la kanuran, ibibian, efikan, tivan, ijoan, edoan, fulfuldean, urhoboan, nupean kaj igalan. La aliaj lingvoj ne devas esti forkonsiderataj kiel "minoritataj" lingvoj, ĉar ja la tuto de ĉiuj, kiuj parolas ilin, formas substancan proporcion de la popolo. Ni rajtas konkludi, ke estas tri funkciaj tipoj de lingvoj en Niĝerio: majoritataj lingvoj kun rolo en nacia nivelo, ĉefaj lingvoj kies rolo restas ĉe la ŝtata nivelo, kaj et-grupaj lingvoj, kiuj funkcias ĉefe je loka nivelo.

Nur Esperanto helpis


I am, dum mi interparolis kun miaj amikoj, kiuj scias nenion pri Esperanto, unu el ili, Ayò, tuŝis la fakton, ke kutime mi ne vizitas lin tiel ofte kiel la aliajn. Mi ekrespondis al li angle, ke li plendas tro multe: "You are too complain..." ("Vi estas tro plend..."). Mi subite konsciis, ke mi ne povas fini la lastan vorton laŭ la maniero, en kiu mi konstruis ĝin. Venis al mia menso la anglaj sufiksoj *-ful*, *-some*, *-ing*, *-ingly*, *-er*, *-ane*; sed neniu taŭgis por fini mian frazon. Mi sciis, ke rekonstrui la frazon montros mian malfluecon en la angla, kiu estas mia nacia lingvo kaj la lingvo, per kiu mi studis en la universitato!

Ankaŭ la manieron laŭ kiu mi povis fini ĝin en mia gepatra lingvo, la joruba, mi ne sciis. Al mi ne venis vorto en la joruba, per kiu mi eksplicitu "kun la emo plendi". *Áwáwí* [aŭaŭi] signifas "plendemo" sed ankaŭ en tiu ĉi kazo necesus, ke mi rekonstruu la frazon kaj mi ne deziris tion fari. Por ne perdi tempon, mi rapide haltis je la vortaĉo "complain..." kaj diris: *plendema!* Mia amiko ekridegis pro la stranga vorto kaj reagis: "Vi frenezas!"

De kiam mi lernis Esperanton mi ĝuas la fakton, ke oni povas uzi la lingvon tiel facile. La prefiksoj kaj sufiksoj tiom helpas paroli facile sed bone.

Ōshō-Davies Olúwábùnmí

DANNY TEN HAAR




La malfacila elekto

Pri la dilemo alfrontita kun 400 lingvoj

Diverseco kaj disdividiteco

La fakto, ke unu lando havas diversajn lingvojn, estas ofte rigardata kiel problemo en si mem. Niĝerio, kun siaj 400 lingvoj, estas forte maltrankvila pri la problemoj de disdividiteco kaj tribeco, kaj la bezono atingi nacian integriĝon. Unu el la popularaj mitoj en plurlingvaj landoj estas la asociado de multeco de lingvoj kun disdividiteco. Spite la ĝeneraliĝon de tiu ĉi mito indas substreki, ke ne estas plurlingvismo en si, kiu kaŭzas disdividitecon, sed la ekspluatado de etnismo lige kun lingvaj diferencoj. En kelkaj landoj la mito de disdividiteco estis uzata por subpremi la parolantojn de et-grupaj lingvoj. Feliĉe, tio ne okazis en Niĝerio.



En kiu el la ĉirkaŭ 400 lingvoj de Niĝerio tiuj ĉi infanoj parolas?

malfacila kandidato de Niĝerio

Fronti la demandon de komuna nacia lingvo en lando rakontas profesoro Ayo Bamgbose.

Kompletiga mito al tiu de disdividiteco estas, ke unu lingvo povas unuigi. En Niĝerio la angla lingvo, kiu estis la oficiala lingvo en la kolonia periodo, estas larĝe konsiderata la plej bona kandidato por unuiga rolo. Ĉar oni ĝin uzis kiel la lingvon de la registaro kaj edukado, tial "unuiganta" elitojn el la diversaj etnaj grupoj, ĝi prezentiĝas kiel solide forta. Plie, ĉar ĝi ne apartenas al iu ajn etna grupo en Niĝerio, oni kredas ĝin "neŭtrala" lingvo. Tamen komuna lingvo ne aŭtomate estigas unuecon, escepte se jam ekzistas unuigaj faktoroj en la koncernaj komunumoj, kaj simple ne estas vero, ke lingvo povas esti neŭtrala, ĉar ĝi neeviteble venas ŝarĝita de la kulturo, kiun ĝi reprezentas.

Tri gravaj demandoj dominis la lingvan politikon de Niĝerio ekde la sendependiĝo. Kiu devas esti la oficiala lingvo de la lando? Kiu el la lingvoj devas ricevi la statuson de nacia lingvo? Kiu lingvo devas esti uzata en edukado?

Ayo Bamgbose, eksprofesoro de lingvistiko en la Universitato de Ibadan (Niĝerio), okupiĝis pri lingvistika esplorado kaj lingvoplanaj aktivaĵoj en Okcidenta Afriko dum preskaŭ 30 jaroj. Lia verkaro inkluzivas *A Grammar of Yoruba* (Cambridge University Press, 1966), *Mother Tongue Education: The West African Experience* (Hodder & Stoughton/UNESCO, 1976) kaj *Language and the Nation* (Edinburgh University Press, 1991).

La angla: nedubebla superreganto

Por kelkaj, la demando de unu oficiala lingvo estas antaŭrespondita. Pro la kolonia heredaĵo uzi la anglan por ĝenerale ĉiuj oficialaj celoj en la antaŭsendependa epoko la ebleco ŝanĝi tiun ĉi praktikon estas preskaŭ nula. La superrego de la angla lingvo estas nedubeble forta. Ĝi estas la lingvo de la registaro kaj administrado, inkluzivigante la aktojn en la Nacia kaj Ŝtataj Asembleoj, la lingvo de edukado en preskaŭ ĉiuj niveloj, la ĉefa lingvo de amaskomunikiloj, la lingvo de scienco kaj teknologio, kaj la lingvo uzata de multaj niĝeriaj romanistoj kaj poetoj. Eĉ la debato pri la dezirindeco de ŝanĝo devas esti farata en la angla!

Provoj redukti la uzon de la angla kiel oficiala lingvo estis unike malsukcesaj. Ekzemple, la konstitucio de 1979 antaŭvidas la uzadon de la tri ĉefaj lingvoj kiel kromaj lingvoj en la Nacia Asembleo, sed nur post submetiĝo al adekvataj preparoj. Tiaj preparoj inkluzivas la kompiladon de leĝa terminologio, trejnadon de tradukistoj kaj interpretistoj, instaladon de aparataro por samtempa interpretado kaj presekipaĵoj, kaj dungadon de personaro por la produktado de Hansard, la oficiala registro de la asembleaj aktoj. El ĉiuj ĉi postuloj, nur la unua estas efektivigita ĝis nun. Sekve neniu niĝeria lingvo estas uzata por la aktoj de la Nacia Asembleo.

Tre diskutata kaj ripetiganta lingva demando temas pri la evoluigo de komuna lingvo kiel nacia lingvo por la lando. Kvankam la naciismaj sentoj certigas, ke la plimulto favoru unu indiĝenan nacian lingvon, tie la konsento finiĝas. La vera problemo estas, kiel decidi, kiu el la 400 niĝeriaj lingvoj estu elektita por tiu ĉi prestiĝa rolo. Kaj jen la timo de dominado reaperas, ĉar parolantoj de pli malgrandaj lingvoj timas, ke ili povos esti supervenkitaj politike, ekonomie kaj lingve de la parolantoj de la ĉefaj lingvoj. Eĉ inter la parolantoj de la tri grandaj lingvoj ne estas konsento, kiu iĝu la nacia lingvo. Frustritaj, kelkaj niĝerianoj prezentis solvojn, kiuj iras de la absurda propono krei artefaritan lingvon per kunmetado de elementoj de diversaj lingvoj ĝis la intensa adopto de et-grupa lingvo por tiel flankenŝovi la parolantojn de la pli grandaj lingvoj kaj egaligi la malavantaĝojn por ĉiuj.

Dum la malfacilaĵoj por elekto de indiĝena nacia lingvo igis aliajn proponi la adopton de fremda afrika lingvo, kiel la suahila el Orienta Afriko aŭ la promocion de la angla de ties statuso de oficiala lingvo al la statuso de nacia lingvo, la oficiala politiko de la registaro estis kuraĝigi en lernejoj al lernado de la tri plej grandaj lingvoj kun la espero, ke unu el ili povos emerĝi en la estonto kiel akceptebla nacia lingvo. Tio ĉi kompreneble signifas, ke la angla, pro manko de alia solvo, plu plenumos la funkciojn atendeblajn de nacia lingvo, eĉ se ĝi ne estas nomata per tia nomo. Ĝuste tiu ĉi malkontentiga pozicio instigis kelkajn aliajn observantojn proponi, ke Niĝerio elektu tri aŭ pliajn naciajn lingvojn en proksimume sama maniero kiel Svislando funkcias nacie en tri oficialaj lingvoj (germana, franca, itala) kaj unu regiona lingvo (romanĉa). Kvankam tio povas montriĝi tre multekosta en la niĝeria kunteksto, ĝi estas almenaŭ pozitiva maniero trarompi senelirejon, kiu efektive lasas la landon kun la angla kiel nacia lingvo pro manko de alia solvo. p. 6

Vero estas la pleja bono". Tiu ĉi simpla kaj saĝa formulo naskiĝis el la buŝo de Zaratuŝtro antaŭ ne malpli ol 3 000 jaroj. Ĝi sciigis la mondon pri apero de la nova religio, nova simbolo de la kredo, nova mondkoncepto. Unuafoje la grandega masivo de Meza Oriento forĵetis de si la primitivan talaron kaj emancipite sin turnis al la ĉielo por fieri kaj liberama

Ora plateto montranta antivan irananon tenantan "barsom" — la saktan zoroastrisman atributon faritan el longaj vergoj uzata dum ritaj ceremonioj.



movado antaŭen. Homoj adreŝis sin al la suno por ricevi feliĉon kaj aranĝi triumfon de la vero kaj justa mondordo sur la Tero. "Bona penso, bona vorto, bona afero" — jen kio devas konsistigi la bazon de la homa ekzistado. Tiu ĉi granda morala eltrovaĵo malkovriĝis al la mondo superinte la pereigan batalon de diverslingvaj popoloj sur la grandaj areoj de mezaziaj stepoj fine de la 2-a kaj komence de la 1-a miljaro a.K. Unuafoje en la historio loĝterkultura kaj stepa brutbreda mondoj plenmove en sia historia evoluo karambolis unu en la alian. Tio estis fatala sperto, historia fendiĝo de la malnova epoko kaj turmenta akuŝo de la nova. La historio kvazaŭ elturniĝis inverse, plene malkovrante sian intiman karnon. Virto kaj malvirto, vero kaj mensogo, vivo kaj morto, heroeco kaj malkuraĝo, milito kaj paco, vorto kaj faro, kreado kaj detruo, pliigo kaj rabo, libero kaj sklaveco, ordo kaj kaoso, bonagado kaj perforto, bonstato kaj mizero, lumo kaj mallumo, amikeco kaj malamikeco, konkordo kaj maltoleremo, kredo kaj malkredo, memoro kaj forgeso — ĉio ĉi riveligis en sia vera aspekto. Ŝajnis, ke la malapero de la homoj estas senfina. Dioj destinis ilin je la morto, ĝis finfine en tiu ĉi maro de kaoso kaj malordo la homo ekaŭdis mirakloefikan vorton de Ahura-Mazdo kapablan "superi ĉiujn malicajn malamikojn" (*Jasna*, XXVIII, 6). Kaj venis Zaratuŝtro kiel sendito de la dio kaj proklamis al la mondo: "Venu fino al rabo! Donu rebaton al ĝi!" (*Jasna*, XLVIII, 7).

"Ho, vi, potenco Mitrao!
Donu al ni forton kaj venkon,
Bonan vivon kaj veron,
Bonan gloron, honeston,
Saĝon, sanktecon, sciojn."

"Estas nur unu vojo, tio estas la vojo de bonagado, ĉio cetera estas senvojejo" (*Vendidad*, 24-a ĉapitro). "Estu en viaj agadoj justaj, raciaj kaj respektemaj" (*Jasna*, LI, 1, 5). "Tiu, kiu ne plenumas siajn vortojn — li estas pli malbona ol cent kanajloj. Estu fidela al la kontrakto" (*Jaŝt*, 10, I, 2). "Dum mi povas kaj dum mi havas fortojn, mi pretas instrui la homojn celi al plej bona Ordo" (*Arta* XXVIII, 4). "Unu kuracas per tranĉilo, alia kuracas per herboj, tria kuracas per sankta vorto" (*Jasna*, III, 6). "Ni volas esti tiuj, kiuj lumigas la tutan mondon por ĉesigi la mensogon" (*Jasna*).

Ankoraŭ neniam en la historio lingvo kaj vorto havis tian packrean patoson kiel en la predikoj de Zaratuŝtro.

VERO ESTAS PLEJA BONO

D-RO VLADIMIR IONESOV, RUSIO

"LA RELIGIO DE ZOROASTRO MULTE PLI INFLUIS LA MONDHISTORION, OL LA PLIMULTO DE LA HOMOJ HODIAŬ KONSCIAS. LA GREKA FILOZOFIO, LA PRAFONTO DE LA OKCIDENTA KULTURO, HAVIGIS SIAJN PLEJ ESENCAJN KONCEPTOJN EL ZOROASTRISMO. MULTAJ INSTRUOJ EL LA MALNOVA KAJ NOVA TESTAMENTO ESTAS SENPERAJ TRANSPRENOJ EL LA SKRIBOJ DE LA ZOROASTRA RELIGIO."*

"Superu en tiu ĉi hejmo
Obeo malobeon,
Paco kverelon,
Malavareco avarecon,
Kredo malkredon,
Vera vorto mensogan vorton
Bonagado mensogon."

(*Jasna*, X)

"Ni preĝas al la Suno,
Al senmorta Lumo...
Por prospero de la mondo
Por kresko de la Vero."

(*Jaŝt*, 6, 1)

"Kaj per la arto de parolo,
Kaj per la penso kaj per la ago
Kaj per la vera vorto,
Mi honoros la Sunon."

(*Jaŝt*, 6)

"Mi preĝas pro la feliĉo..."
"Vero estas la pleja bono"


(*Jaŝt*, 6,7)

La plej alta virto por la homo estas ĉiutaga laboro, pliigo kaj fekundeco. "Kiu semas panon, tiu semas bonagon..." — instruis Zaratuŝtro (*Vendidad*, 3).

LIA SANKTA VORTO dum multaj jarcentoj konkeris la mensojn de la mezazia socio kaj reeĥis malproksime trans ĝiaj limoj, kreante eble la unuan spiritan ponton inter Oriento kaj Okcidento. Kiel ĝuste rimarkigis Jean Duchesne-Guillemin: "El ĉiuj filoj de Azio, la unua, kiun 'adoptis' Okcidento, estis Zaratuŝtro". Dum jarcentoj Zaratuŝtro "... estis la sola, kiu reprezentis en Okcidento la antikvan azian saĝecon" (Duchesne-Guillemin J., *The Hymns of Zarathustra*, 1952, p. 1-2).



Statua urno 102cm alta el bakita argilo responda al la zoroastra entombiga tradicio. Elterigita en Khorezm.



"Zoroastro en sia studio", flandra miniaturo de la 15-a jc (Brita Muzeo).

* El **UNUECO EN DIVERSECO**. Kompilis O.P. Ghai, elangligis H.D. Maas. Rosenheim: Horizonte Verlag, 1989. 67p. 22cm. 19,50 gld.). En ĝi eblas trovi pli pri zoroastrismo kaj aliaj grandaj religioj.

Tamen, malgraŭ la tutmonda famo de zoroastrismo kiel unu el la plej antikvaj humanaj kaj pacokreaj religiaj doktrinoj, la historio kaj antaŭhistorio de ĝia apero restas ekskluzive komplika kaj implikita temo por la historia esplorado. Kien kondukas la fontoj de zoroastrisma ideologio? Sur kiu historia kaj kulturpsikologia fundamento elkreskis la bazaj mondkonceptaj postulatoj kaj moralaj idealoj de la nova kredo? Jam dum multaj jardekoj diverslandaj historiistoj klopodas respondi al tiuj ĉi demandoj, sed ĝis nun tiu ĉi problemo daŭre restas ege aktuala.

Preskaŭ plena foresto de skribaj atestoj por tiel frua periodo (2-a ĝis 1-a jarmilo a.K.), faris arkologiajn materialojn verŝajne la plej grava fonto de historiaj informoj. Sed identigi la arkologiajn monumentojn kun la plej antikvaj materialaj atributoj de zoroastrismo (dum periodo de ĝia formiĝo) estas treege malfacile kaj iufoje simple neeble. Tio naskas multajn versiojn, variantojn, historiajn rekonstruojn, ne malofte tute malsamajn inter si. Kiel naskiĝlokon de zoroastrismo oni mencias la plej diversajn historiajn regionojn — Ĥorezmon, Margianon, Iranon, Baktrion, stepojn de Kazahio, Azerbajĝanon. Kaj ankaŭ la tempo de ĝia apero datiĝas tute diverse, de la 17-a jarcento a.K. ĝis la 6-a jarcento a.K. Tamen la plimulto de la esploristoj insistas je Baktria-Margiana origino (apud la amudarja regiono) de



Emblemo de zoroastrismo sur muro en Teherano. Hodiaŭaj kredantoj vivas diaspore en Irano kaj Hindio.

zoroastrismo. Kaj lige kun tio ege gravas la lastaj arkeologiaj malkovroj de antikvaj baktrianaj kaj proto-baktrianaj monumentoj de la malfrua bronza kaj frua fera epokoj (la dua duono de la 2-a — komenco de la 1-a jarmilo a.K. en suda Uzbekio (Ĝarkutan, Bustan, Sapallitepa, Molali, Pŝaktepa, Kiziltepa, Kuĉuktepa, Bandyĥan k.a.).

ĈI TIE ESTIS TROVITAJ la plej fruaj postsignoj de la antaŭzoroastrisma historio. Inter ili

estas en Ĝarkutan la plej antikva templo de fajro en Meza Oriento kaj ties multenombraj sakramentaj atributoj kaj simboloj (altaroj de fajro, akvaj fontoj, ritaj ujoj, vinfarejoj kc). En la materiala kulturo de la proto-baktria civilizacio estas jam sufiĉe rimarkeble reprezentita la sankteco de la homo, brutaro, fajro, akvo, aero, tero, plantoj, kio pli malfrue eniris la grupon de la plej sanktaj kreaĵoj de Ahura-Mazdao. La antikvaĵojn de Ĝarkutan similas ankaŭ la arkologiaj materialoj el la margiana monumento Togolok-21 (sudoriente de Turkmenio). Laŭ ĉio videblas, ke en la baktria-margiana regiono fine de la 2-a jarmilo a.K. intensive akumuliĝis materialoj kaj spiritalaj premisoj por formiĝo de la nova religia kredo. Tamen, por ĝia vera naskiĝo estis necesa forta puŝo, skuo, liberiĝo. Ĉi tion ne povis doni la tradicia loĝterkultura vivsociordo kun ties rigora pastra monopolo kaj burokrata reglamentado de vivagado de la homoj, kiu katenis ties liberon kaj elektoeblon. Sed la movadon, forton, liberamon, volon kaj pasion abunde alportis la stepaj triboj de iranlingvaj brutbredistoj, konkerintaj komence de la 1-a jarmilo a.K. preskaŭ la tutan mezazian mondon.

Tiel komenciĝis la aktiva transformado, sintezo kaj filtrado de diversaj etno-kulturaj kompleksoj. En tiu ĉi interagado kaj sintezo estis formiĝintaj, laŭ nia opinio, la bazaj simboloj de la zoroastrisma kredo. La veroj de zoroastrismo naskiĝis en la turmentaj akuŝpasmoj de loĝterkulturaj kaj stepaj brutbredaj tradicioj, etnoj, kulturoj kaj civilizacioj. Povas esti pro tio, ke la tuta religia kaj etika doktrino de zoroastrismo estas trapenetrita de la esprimoplena kaj ĉion-gluta dualismo — batalo inter bono kaj malbono, lumo kaj mallumo, milito kaj paco kc. Kaj en tiu ĉi kruela batalo ĝuste Zaratuŝtro “estis la unua, kiu vokis la homojn al longtempa, prospera kaj fortika kunlaboro” (Jasna, X, 3). Li vokis siajn homojn:

“Per artoplenaj paroloj,
Kaj penso kaj agoj,
Kaj per diritaj ĝuste
Verecaj vortoj.”

(Jaŝt, 5, 1, 9)

Ĉu ne de ĉi tie komenciĝis la granda historio de Oriento kaj Okcidento? Ĉu ne tio estis la unua akto de la homa pentado kaj eble la plej efika kaj utila leciono de saĝeco por la tuta posta evoluo de la surtera civilizacio? □

Tombo de dismembrigita homa skeleto ilustranta la naskiĝon de zoroastrismaj normoj en la enteriga rito de antikvaj ĝarkutananoj (12-a ĝis 11-a jc a.K.).



VITALI GRACENKO

Statueto el bronzo kovrita de oro reprezentanta preĝanton, 1700 a.K. (Muzeo Louvre)

Trakribrado de kolektoj de proverboj sisteme kaj laŭteme kompilitaj indikas, ke la hundo estas plej verŝajne la plej ofte pritraktita besto. Kelkaj saĝaj eldiroj emfazas la elstare noblajn kvalitojn de "la plej bona amiko de la homo", dum aliaj ofte cititaj popoldiroj avertas pri malagrablaj aspektoj de la konduto de tiu besto. Post legado de la sekvaj karakterizaĵoj, vi mem povos tiri viajn proprajn konkludojn pri rilatoj inter hundoj kaj homoj.

A. Neŝanĝebleco. Pluraj proverboj akcentas, ke la baza naturo de la hundo estas neŝanĝebla kaj supraĵaj eksteraj trajtoj ne gravas.

1. La felo de la hundo ne ŝanĝiĝas.
2. Blanka hundo, nigra hundo — ĉiam hundo.
3. Lavu hundon, kombu hundon, tamen hundo estas ankoraŭ hundo.
4. La hundo estas la sama; ĝi ŝanĝis nur sian kolbendon.
5. Hundo de la pasinta jaro estas hundo en tiu ĉi jaro.
6. Kiu estas hundo dumvive estas hundo postmorte.

B. Fideleco kaj pacemo. Tiuj ĉi trajtoj estas universale laŭdataj.

1. Hundo memoras tri tagojn de bona traktado dum tri jaroj; kato forgesas tri jarojn da bona traktado post tri tagoj.
2. Eĉ hundo ne forkuras de sia tendo.
3. Hundo ne atakas hundon.
4. Se la hundo iras, kiam la kato venas, ne estas kverelado.
5. Post iom da tempo eĉ la hundo faras kompromison kun la kato.

C. Malbonkonduto. Ne ĉiam hundoj montras sin pacemaj kaj obeemaj. En tiaj okazoj batado estas la kutima rimedo.

1. Al hundo bastono — al hom' leciono.
2. Se vi ludas kun hundo, estu bastono en via mano.
3. Se mi vidas hundon, ne estas ŝtono, kaj se mi vidas ŝtonon, ne estas hundo.
4. La vaganta hundo estas batata ĉie.
5. Mia hundo akceptos miajn batojn sed fuĝas de la bastono de fremdulo.
6. Hundo, kiu estis batita per bastono, timas ĝian ombron.
7. Sufiĉas montri vipon al batita hundo.

Ĉ. Bojado. Hundoj esprimas sin nature per bojado, sed ofte tiu agado estas sen kialo kaj tute vana.

1. Bojas hundido, ĉar tiel faras la hundo.
2. Homoj devas havi ion por diri, hundoj ion por boji.

3. Hundo povas boji eĉ kontraŭ la reĝo.
4. Bojas hundo sen puno eĉ kontraŭ la suno.
5. Lu hundo bojas je nenio, kaj la aliaj bojas je ĝi.
6. La luno ne aŭskultas, kiam hundo ĝin insultas.
7. La bojado de hundo ne malutilas la nubojn.
8. Ne gravas kion hundo bojas; la monteto ne disfalos.
9. Hundo bojas la vojon, vento postas la bojon.
10. Hundo bojas, homo vojas.

Vaŭ vaŭ!

Proverboj pri mi kaj mia plej bona amiko

— Bernard Golden,
Hungario

D. Bojado de maljuna hundo. Male, oni atentu la bojadon de maljuna hundo.

1. Maljuna hundo ne vane bojas.
2. Se maljuna hundo bojas, serĉu la kialon.
3. Maljuna hundo ne hurlas kontraŭ arbostumpo.


E. Bojado estas sendanĝera. Hunda blekado mem ne kaŭzu timon.

1. Ne ĉiu hundo bojanta estas hundo mordanta.
2. Ne timu hundon bojantan, timu hundon silentan.
3. Ne mordos la hundo, kiu bojas, sed tiu, kiu ĉirkaŭiras silente.
4. Maldikaj hundoj plej laŭte bojas.
5. La hundo, kiu bojas en sia propra strato, estas muĝanta leono.
6. Bojado de sendenta hundo estas same bona kiel ĝia mordado.

NOMBRU KIOM DA HUNDOJ?

facila

Multaj legantoj sciigas nian redaktejon, ke ili legas la tuton de ĉiu numero de *KONTAKTO*. Surbaze de tiu fakto ni ĉi-foje proponas al vi ege facilan manieron gajni premion. Fakte ne necesas lerto aŭ grandaj konoj — nur iom da atento: **Vi devas malkovri, kiom da fojoj aperas la radiko* hund en tiu ĉi numero de *KONTAKTO*.** En la kazo, ke neniu trafos la precizan nombron ni aljuĝos la premion al tiu, kies propono plej proksimiĝas al la ĝusta. La respondon sendu al nia redaktejo antaŭ la 31-a de januaro 1997. Unu el la partoprenantoj gajnos *Senĝenaj dialogoj* de Alberto Fernández — tre interesan popularsciencan libron en formo de interparoloj, kun



*bazo de vorto belaj bildoj tutpaĝaj. Ek al la kalkul'!

F. Mordado. Oni ja estu singarda kontraŭ hundoj, kiuj mordas.

1. Ne estas pli malbona hundo ol tiu, kiu ne mordas.
2. Mordanta hundo ne montras siajn dentojn.
3. Se vi tiras hundon el la akvo, ĝi mordos viajn krurojn.
4. Ĉiuj hundoj mordas morditajn hundojn.
5. Mordantaj hundoj kuras ĉiam kun vundoj.

G. Manĝado. Por bone koni hundojn oni devas informiĝi pri iliaj manĝokutimoj.

1. Hundo ne manĝas hundon.
2. Oni ne povas manĝigi du hundojn el unu supo-poto.
3. Lasu en paco manĝantan hundon kaj dormantan homon.
4. Ne kontentigu vian hundon; igu ĝin malsata, ĝi sekvos vin.
5. La hundo reiras al la loko, kie oni manĝigis ĝin.
6. Alproksimiĝas la morto de hundo, kiam ĝi manĝas la panon de la paŝtisto.

Ĝ. Puloj. Tiuj malgrandaj insektetoj rilatas al hundoj same intime kiel hundoj al homoj.

1. Eĉ la hundo de la reĝo havas pulojn.
2. La hundo en la hundejo bojas kontraŭ siaj puloj; la hundo, kiu ĉasas, ne sentas ilin.
3. Kiu kuŝas kun hundoj, vekiĝos kun puloj.
4. Violonistoj, hundoj kaj puloj venas al festenoj neinvitite.

H. Hundoj kaj virinoj. Pluraj proverboj el diversaj kulturoj faras — prave aŭ ne — malfavorajn komparojn inter hundoj kaj virinoj.

1. Hundo estas pli saĝa ol virino; ĝi ne bojas kontraŭ sia mastro.
2. La parolado de dommastrino kaj la bojado de hundo estas la samaj.
3. Oni neniam kredu la ploradon de virino nek la malgajecon de hundo.
4. Estas pli malbone inciti maljunan virinon ol maljunan hundon.
5. Virino kolera pli ol hundo danĝera.
6. Per hundoj oni kaptas leporojn, per laŭdo stultulojn, per mono virinojn.
7. La plej bona amiko de viro estas la hundo, eĉ pli bona ol lia edzino.
8. La hundo estas mia amiko, mia edzino mia malamiko, kaj mia filo mia mastro.
9. La fideleco de hundo daŭras ĝian tutan vivon, tiu de virino ĝis la unua okazo.

Ĥ. Ostoj. Ne facile disigeblaj estas hundoj kaj ostoj, ankaŭ en pluraj frazeologiaj esprimoj.

1. Hundo povas sonĝi nur pri ostoj.
2. Eĉ hundo rifuzas sekan oston.
3. Kiu deziras akiri oston de hundo, devas doni anstataŭe la viandon.
4. Kiu fariĝas hundo, devas ronĝi ostojn.
5. Du hundoj pri unu osto malofte akordas.
6. Du hundoj kverelas pri osto kaj la tria forkuras kun ĝi.

I. Mastroj. Gravaj ankaŭ estas la rilatoj inter hundoj kaj mastroj.

1. Por ĉiu hundo estas kondukŝnuro.
2. Ne forpelu hundon sen scii, kiu estas ĝia mastro.
3. Hundo gardanta du pordojn restos malsata.
4. Maldika hundo hontigas sian mastron.
5. Se la gasto meritas, eĉ lia hundo profitas.

J. Ĉasado. Krom gardado, ĉasado estas ofta okupo de hundoj.

1. Hundo bonrasa estas bona por ĉaso.
2. Ne estas pli bona ĉasado ol kun maljunaj hundoj.
3. Ŝnure ligita hundo ne bone ĉasas.
4. Devigita hundo ne kaptas leporon.
5. Inter la multe da hundoj la leporo pereas. □

BELARTAJ KONKURSOJ DE UEA EN 1997

La Belartaj Konkursoj de UEA denove invitas partoprenantojn por sep branĉoj. La rezultojn oni anoncos kadre de la Universala Kongreso en Adelajdo. Same kiel la UK mem, ankaŭ la Belartaj Konkursoj konkeros novan kontinenton kiel sian scenejon. La laŭreatojn atendas monpremioj, kiuj estas pli altaj ol antaŭe. Ĉiuj konkursaĵoj devas esti novaj kaj, escepte de la infanlibroj, ne publikigitaj. Krome validas jenaj kondiĉoj:

Poezio: Maksimuma longo ne fiksita. Tri premioj.

Prozo: Maksimuma longo 200 x 65 tajpospacoj. Tri premioj.

Teatraĵo: Maksimuma longo ne fiksita. Tri premioj.

Eseo: Teme ligita kun Esperanto aŭ kun la temo de la 82-a UK: "Toleremo kaj justeco en multkultura mondo". Premio "Luigi Minnaja" kaj du aliaj premioj.

Kanto: Teksto kaj melodioj povas esti de malsamaj aŭtoroj. Premio "Ahn Song-san" kaj du aliaj premioj.

Vidbendo: Temo prefere ligita kun Esperanto. Maksimuma daŭro 30 minutoj. Sistemo VHS/PAL. Tri premioj.

Infanlibro de la Jaro: Originala aŭ tradukita libro, presforme aperinta en 1996. Unu premio.

Sendo: Oni rajtas sendi maksimume tri konkursaĵojn por sama branĉo. Por poezio, prozo, teatraĵo, eseo kaj kanto oni sendu ilin en kvar ekzempleroj; por la infanlibra branĉo en tri ekzempleroj. Ĉiuj alvenu plej laste la 31-an de marto 1997. Por vidbendo oni sendu po unu ekzempleron ĝis la 1-a de julio 1997. Ĉion oni adresu al: Belartaj Konkursoj de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.


La konkursaĵoj (krom vidbendoj kaj infanlibroj) estu pseŭdonimaj. La vera nomo kaj la adreso estu en aparta koverto. Se eble, oni aldonu 5 internaciajn respondkuponojn por ĉiu branĉo en kiu oni konkuras.

Premioj: Unua premio: 400 gld. Dua premio: 280 gld. Tria premio: 160 gld. Nova Talento (por la plej bona konkursanto antaŭe ne premiita): 280 gld. Infanlibro de la Jaro: 840 gld.

Publikigo: La rajto je la unua presigo de la premiitaj verkoj apartenas al UEA, kiu ankaŭ poste rajtos aperigi ilin senpage en antologio de la Konkursoj.


Detala regularo haveblas kontraŭ unu respondkuponon ĉe UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Certe vi jam foje spertis, ke vi ek-simpatias* kun iu knabo aŭ knabino kaj ege ŝatus enamiĝi al li aŭ ŝi. Sed ofte mankas okazo por montri tiun ĉi simpatian, aŭ vi simple ne sukcesas fari tion, ĉar vi tro ek-maltrankvil*-iĝas en la proksimeco de via karulo. Se vi regule vidas lin aŭ ŝin ekzemple en la lernejo, universitato aŭ via loka Esperanto-klubo, vi eventuale* povas simple iom atendi ĝis vi kuraĝ*-egos komprenigi al li aŭ ŝi vian kor-inklinan*. Tute alia povas esti la situacio en libertempaj aranĝoj*, ekzemple en internaciaj Esperanto-renkontiĝoj. Rapide alproksimiĝas la fino de la aranĝo, kaj vi eĉ ne scias, ĉu vi ankoraŭ iam revidos vian karulon. Eble nur post kelkaj monatoj, eble eĉ neniam.



En tia situacio indas pensi pri tio, ke post la aranĝo vi povos daŭrigi la kontakton skribe kaj tiamaniere eble profund*-igi ĝin. Se vi ankoraŭ ne havas la adreson de via karulo, necesos peti ĝin de li aŭ ŝi aŭ, se eĉ por tio mankas al vi la kuraĝo, eventuale demandu iun el liaj aŭ ŝiaj geamikoj.

Verŝajne post la reveno de la aranĝo vi vere plu deziras la kuneston de via karulo. Tiam unue konsciĝu pri tio, ke senti korinklinon al iu estas tute normala kaj eĉ tre salutinda sento. Sekve vi tute ne devas timi malkaŝi al li aŭ ŝi vian simpatian, se li aŭ ŝi ne jam ŝajnas havi ligan al iu alia.



Kiam vi skribas leteron, vi povas trankvile kaj senrapide vortigi viajn sentojn: "Kara Andrea, hieraŭ mi revenis de la IJK, kaj kvankam* ni tie ne multe interparolis, mi nun klare sentas, ke vi tre mankas al mi." Aŭ komencu jene: "Kara Andrea, jam pasis tri tagoj post la reveno de la IJK, kaj tamen mi ankoraŭ multe pensas pri vi."

Se de via lasta renkonto jam pasis pli da tempo, viaj unuaj vortoj povus esti ekzemple "Tiun ĉi leteron mi skribas al vi simple pro tio, ke mi trovas vin tre simpatia".

Nun vi povas daŭrigi per komplimentoj*: "Vi estas ege plaĉa, dolĉa, simpatia, rave* bela, tre bonkora, sindona, saĝa*...". Simple elektu kelkajn tiajn ecojn kaj klarigu pri ili: "Ege ravas min viaj grandaj vivoplenaj okuloj... Via varma, elkora rideto profunde feliĉigis min... Mi tiom ŝatas vin, ĉar kun vi mi povas bonege interparoli kaj multege ridi... Ĝuste pro viaj idealoj* mi trovas vin tiom al-tira... Vi estas belega ne nur korpe, sed ankaŭ laŭ via personeco... Mi ege raviĝas de via helpemo kaj respondeco, ekzemple kiam vi okupiĝis pri la organizaj laboroj de nia aranĝo, dum ĉiuj aliaj nur plezuris...".

Rimarku, ke komplimentoj plej ĝojigas, kiam ili estas unuopulaj kaj kredindaj. Alivorte, via karulo trovu ilin veraj, sed ili ne estu same uzablaj por tro multaj aliaj homoj. Pro tio la pli simpla aliro al persona amletero, la ebleco montri vian korinklinon per karto, kiun oni tiucele produktas kun ridiga bildo kaj plaĉa skribaĵo estas preferinda nur tiam, kiam mankas al vi ideoj aŭ skribemo.


Kiel skribi a

Skribi la unuan amleteron povas esti tre malfacila laboro. Kun granda kono pri la temo, la aŭtoro verkis tiun ĉi artikolon por helpi, kiam vi decidus surpaperigi viajn sentojn kaj adresi ilin al via kara.

Vi povas fini vian leteron ekzemple per la vortoj "Mi tre ŝatus koni vin pli profunde, kaj tial mi tre ĝojus, se vi reskribus al mi". Se vi sufiĉe klare montris vian simpatian, ne estas bezono por pli malferme vortigi vian deziregon pri enamiĝo. Ja se via karulo interesiĝas pri vi kaj respondos, vi havos ankoraŭ la eblon por pliklarigi viajn dezirojn kaj esperojn. Komprenoble, se vi estas iom ne atendema aŭ se vi jam sufiĉe bone konis vian karulon antaŭ ol skribi vian leteron, vi povas fini ĝin ankaŭ per "Mi ege ŝatus enamiĝi al vi".

La unua letero al via karulo

ne devas esti longa. Komprenoble, se vi ŝatas skribi multon, vi povas rakonti iom pli pri vi aŭ pri viaj komunaj travivaĵoj. Eventuale vi povus jam diri pri la eblo de sekva renkontiĝo. Cetere, kelkaj knabinoj tre ĝojas, kiam knabo plifortigas sian am-deklaron* per valoraj donacoj*, ekzemple beligaĵoj aŭ invitoj al vojaĝoj, dum multaj aliaj sentas sin tro mem-amaj por akcepti ion tian (kvankam ofte ankaŭ ili ĝojas pri la invito). Sed pri ĉio ĉi vi ankoraŭ ne devas zorgi en via



KRUCVORTA KONKURSO — NOVA REKORDO!

Nia redakcio ricevis entute 36 respondojn al la krucvorto de Keyhan Sayadpour el Irano publikigita en *KONTAKTO* 152 (1996:2), el kiuj 29 estis ĝustaj kaj sekve konsideritaj en la lotumado. Partoprenis homoj el Alĝerio, Angolo, Bjelorusio, Brazilo, Francio, Germanio, Hispanio, Hungario, Irano, Italio, Katalunio, Kubo, Makedonio, Nederlando, Niĝerio, Rusio, Slovakio, Svedio kaj Usono. La feliĉo, kiu ĉi-foje venis de la manoj de Humphrey Tonkin, iris al Ogunlowo Emmanuel Olorunfemi el Niĝerio, por kiu premio jam survojas. Gratulon al la venkinto kaj al la verkinto de la krucvorto!

| | | | | | | | | | |
|----|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| 1 | T | U | R | N | ■ | E | K | S | A |
| 2 | ■ | K | O | N | T | A | K | T | O |
| 3 | K | ■ | M | ■ | I | R | ■ | P | ■ |
| 4 | O | P | ■ | A | M | O | J | ■ | L |
| 5 | L | A | S | T | ■ | U | Z | O | S |
| 6 | O | R | D | E | ■ | N | O | K | T |
| 7 | R | O | ■ | N | O | V | A | ■ | I |
| 8 | O | ■ | M | ■ | L | I | ■ | K | ■ |
| 9 | ■ | Z | A | M | E | N | H | O | ■ |
| 10 | D | O | N | I | ■ | A | L | I | A |

Por esti ĝisdata pri la evoluo kaj faka literaturo de interlingvistiko kaj esperantologio

INFORMILO
POR INTERLINGVISTOJ

Jara abono (tri n-roj po 16p.) 10 gld.; EU-landoj 10,60 gld. Abonu ĉe UEA.

POCKET
ESPERANTO
DICTIONARY

RABATO

La plej bona nun po nur 21,- gld.

Ulrich Matthias, Germanio



FRANÇO YEDDIEY

unua letero. Kelkfoje senpripense vortigi donacemon povas estigi eĉ malsimpation. Knabo, kiu skribas al sia karulino: "Ĉar vi loĝas en malriĉa lando, mi kore donacus al vi vian IS-aligon", povas ofendi* ŝin per tia supereco. Estas grave rimarkigi pri tio, ĉar en internaciaj kontaktoj tiaj ofendoj estas oftaj.

Se vi zorgas pri la memamo de via karulo kaj vidigas per via letero, ke per ĝi vi simple celas feliĉigi du homojn, vi povas esti certa, ke via karulo ne reagos malbone. Tamen la respondo povas esti "negativa"*. Eble via karulo jam havas koramikon aŭ simple ne povas bildigi al si, ke li aŭ ŝi enamiĝas al vi. Tiam estas rekomendinde akcepti tion. Alie vi povas fariĝi sekvemaĉa, kaj eble via "viktimo"* tiam rakontos al siaj geamikoj, ke "post la IJK tiu ulo daŭre skribis al mi stultajn* leterojn". (Aliflanke ne malmultaj homoj finfine trovis feliĉon dank' al tio, ke ekzemple duonan jaron post negativa respondo ili ripetis sian amdeklaracion.)

Sed eĉ se enamiĝo ne eblas, via karulo eble montros la deziron plu leteri aŭ interparoli kun vi. Tiam vi eble baldaŭ rimarkos, ke via letero havigis al vi interesajn kaj profundajn interŝanĝojn de pensoj kaj spertoj. Kaj vi vidos, ke skribi vian leteron valoris jam pro tio, ke dank' al ĝi vi eksciis multon interesan pri aliaj homoj kaj pri vi mem.

Sed vi povas gajni ankaŭ multe pli. Feliĉon al vi!

aranĝo: renkontiĝo, ekz. kongreso
deklaro: sciigo

donaco: io, kion oni transdonas al alia pro danko, amo aŭ alia sento
eventuale: tiel, ke ĝi povas okazi
idealo: la plej alta celo
inklino: emo

komplimento: dolĉegaj vortoj por plaĉi al iu

kuraĝi: ne perdi la fortojn antaŭ malfacilaĵoj; mal-timi

kvankam: eĉ se

negativa: nea

ofendi: forte malkontentigi aŭ mal-

plezurigi alian ĉe lia mem-amo
profundo: granda malproksimo de la supraĵo

rave: tiel, ke ĝi sentigas fortegan sekvemon al aliaj

saĝa: tia, ke oni povas vidi la aferojn kiaj ili estas, kaj sekve ĝuste agi

simpatii: inklini al alia persono, pro komunaj sentoj

stulta: mal-saĝa

trankvila: paca; sen zorgoj aŭ timoj

viktimo: persono, kiun alia malhelpegas

La malfacila elekto de Niĝerio (daŭrigo)

Edukado kiel ŝlosilo por ŝanĝo

Ŝanĝoj en lingvaj kutimoj ne estas facile devigi, sed edukado donas bonan ŝancon modifi la lingvouzon. Tial multo el la lingva politiko de Niĝerio estas bazita sur la eduka sistemo. La principoj sur kiuj la politiko pri la eduka lingvo baziĝas estas: egala ŝanco de aliro al la eduka lingvo; solida fundamentado en la propra lingvo de la infano; plena mastrado de la angla; kaj dulingvismo en du niĝeriaj lingvoj.

Egalecon en la aliro al la lingvo de edukado oni iniciatas komencante la bazan edukadon en la gepatra lingvo de la infano aŭ, se tio ne eblas, en la lingvo de la plej apuda komunumo. Ankaŭ adolta alfabetigado estas instruata en la lokaj lingvoj de la plenkreskaj lernantoj. Per tiu ĉi politiko neniu lingvo estas ignorata nur ĉar ĝi estas eta. Tamen, estas praktikaj limigoj. Kelkaj lingvoj ankoraŭ ne estas skribaj lingvoj, kaj kelkaj ankoraŭ ne sufiĉe por ke en ili oni produktu alfabetigan materialon. En tiaj kazoj, edukado okazas en la lingvo de la plej apuda komunumo. Tiu ĉi situacio ne restas senŝanĝa ĉar pli kaj pli da lingvoj estas analizataj de lingvistoj kaj iĝas skribaj lingvoj.

Oni supozas, ke fundamentadon en la patrina lingvo de la infano garantias enkonduko en legado, skribado kaj aritmetiko en la denaska lingvo de la infano, kaj la uzo de tiu lingvo kiel perilo de instruado por la unuaj tri jaroj de la elementa edukado. Krom la limigoj supre menciitaj, kiuj povas konflikti kontraŭ la realigo de tiu ĉi celo, la sinteno de gepatroj kaj vartistoj ofte kontraŭas la principon de patrinlingva edukado. Tio ĉi okazas ĉar multajn infanojn de elitaj hejmoj oni sendas al pagataj lernejoj, kie oni instruas ilin en la angla.

Tamen regado de la angla estas instigita per la enkonduko de la angla en la unua jaro de la elementa lernejo kaj ĝia posta adopto kiel perilo de instruado por la cetero de la edukado de la infano. Spite al la enorma kvanto da tempo dediĉita al la studo de la angla, ofte oni aŭdas plendon, ke la nivelo de la angla en Niĝerio estas malalta. Pruvo de tiu ĉi nesufiĉeco estas la malalta poentaro ofte registrata en lernejoj atestiloj kaj ankaŭ en universitataj enir-ekzamenoj. La kaŝita kaŭzo de tiu ĉi problemo montriĝas la apartiĝo de la instruado de la gepata lingvo kaj de la angla. En eksperimentoj, kie oni rilatigis ambaŭ, oni registris signifajn sukcesojn. La demando estas ne kiel longe oni lernas la anglan sed kiel bone.

Unu malavantaĝo de la nuna praktiko estas la antaŭsupozo, ke ĉiu elementlerneja instruisto kapablas bone instrui la anglan. Ankoraŭ tio ĉi ne estas ĉiam vero: kelkaj elementaj instruistoj tre malperfekte parolas kaj skribas la anglan. Aliro, kiu provizas specialajn instruistojn de la angla paralele al la instruistoj de aliaj studobjektoj instruataj en la gepatra lingvo, donis bonegajn rezultojn en la mastrado de la angla kaj la gepatra lingvoj.

La postulo, ke ĉiu niĝeria infano lernu unu el la tri plej grandaj lingvoj aldone al sia propra lingvo, celas faciligi la eventualan emerĝon de unu nacia *lingua franca*. Tiu ĉi politiko celas plifortiĝi en la duagrada nivelo, depende de la disponebleco de instruistoj. Multaj lernejoj rifuĝis en tiun eskapo-klaŭzon kaj diversaj ŝtataj registaroj faris nenian penon produkti instruistojn por la plej grandaj lingvoj. Anstataŭe, mildaj alternativoj kiel la uzo de netrejnita indigenaj parolantoj por instrui nur parolajn formojn de la lingvo estis adoptitaj, kun katastrofaj rezultoj. Ŝajnas, ke ne plu restas multa entuziasmo por la realigo de tiu ĉi politiko, kiu tre povas esti ligita kun interkonfliktaj sintenoj pri la nacia lingva demando.

En Niĝerio oni akre konscias pri kelkaj el la plej gravaj lingvaj problemoj. Estas ankaŭ inspiritaj provoj ataki ilin per la formulado de adekvata lingvopolitiko. Kio mankas estas la volo efektiviĝi la politikon. Tio ĉi povas ŝuldiĝi al la manko de fido en la politiko ne nur flanke de la popolo, sed ankaŭ flanke de la politikfarantoj mem.

(Esperantigita el THE UNESCO COURIER feb. 1994)

Jam la dana historiisto Gramatikus rakontas en sia historio pri piratado pri svedino Alvida. Li nomis ŝin "Piratino de Balto" kaj notis, ke kun ŝi komenciĝis la piratado de la mezepoko. La piratino edziniĝis kun dana princo, kiu sensukcese provadis malhelpi ŝiajn piratajn heroaĵojn.

En Francio, en la unua duono de la 14-a jarcento, oni mencias piratinon Jeanne de Belville [jan de belvil']. La historio diras, ke spertinte la mortigon de sia edzo pro onidira kunlaboro kun la angloj, ŝi vendis sian tutan havaĵon kaj aĉetis tri ŝipojn, sufiĉe da armiloj kaj ekkrozis laŭ Maniko, la Kanalo inter Francio kaj Anglio, atakante la francajn ŝipojn por venĝi sian edzon. Ŝi malaperis subite, kun siaj du filinoj.

Ankaŭ angloj havis sian piratinon, Lady Killingragh [lejdi kilin-gra']. Kune kun sia edzo, dum la regado de reĝino Elizabeta la 1-a, ŝi kondukis la plej grandan piratan kompanion de Anglio. Ankoraŭ ne estas malkovrita la sekreta trapasejo inter ŝia domo kaj la maro. Estas sciata nur, ke laŭ tiu vojo ili transportis la rabaĵon ĝis la keloj, de kie oni dissendis ilin plu. En tiu tempo komenciĝis la fondiĝo de societoj, kies celo estis organizi piratajn ekspediciojn por ataki hispanajn ŝipojn, kies profiton oni dividis. Pro certaj intrigoj en januaro 1592 Lady Killingragh finis sian karieron en la kortumo. Dank' al reĝino Elizabeta la piratino evitis la morton.

Du el la plej konataj piratinoj estis Anne Bonney [an boni] kaj Mary Read [merid].

Anne Bonney estis eksterleĝa filino de irlanda advokato el Cork [kork]. Li translokiĝis al Nordameriko, kie li sukcese laboris. Sed lia filino havis nekutiman edukon: jam ekde ŝia unua vivojaro la patro vestis ŝin per viraj vestoj kaj Anne pasigis sian infanaĝon kun knaboj. Ŝi kondutis kiel knabo kaj eĉ estis la plej kuraĝa kaj forta inter ili. Kiam Anne komprenis, ke ŝi ja estas virino, ŝi surmetis robon. Sed la vestaĵo ne ŝanĝis ŝian konduton.

Kiel filino de riĉa kaj eminenta homo, Anne estis interesa por la filoj de la

ĉirkaŭaj farmistoj, sed ŝi elektis la havengardiston Bonn. Ili kune foriris al insulo New Providence [nju provdens], tiam konata kiel pirata nesto. Tie Anne konatiĝis kun la fama pirato Rackham [rakhham], pli konata kiel Calico Jack [kaljko ĝak]. Ŝi tuj kuniĝis al li en liaj danĝeraj aventuroj.

Vestita kiel viro Anne kune foriris kun li al Jamajko, insulo sub angla regado. Tie ili aliĝis al pirata ŝipo, kiu preparadis sin por ekiri prirabi hispanajn ŝipojn.

prenis batalojn kaj neniu dubis pri ŝi. Dum la soldatado ŝi pli intimiĝis al unu amiko kaj malkovris al li, ke ŝi estas virino. Je granda ĝojo de la tuta regimento ili geedziĝis. Post tio ŝi kompreneble devis forlasi la ŝipon. Ŝi malfermis restoracion, kiu bone funkciis ĝis la morto de ŝia edzo. Tiam ŝi denove vestis sin per vira vestaĵo kaj enŝipiĝis en la sama ŝipo, kie iam ŝi trovis Jack kaj Anne. Tiel okazis, ke eĉ du virinoj estis sur unu pirata ŝipo.

Mary denove enamiĝis kaj tuj decidis, ke ŝi kaj ŝia amato revenu al trankvila vivo. Dum ili atendis okazon forlasi piratadon, la fianĉo de Mary kverelis kun maristo kaj defeis lin. Timante perdi sian estontan edzon, Mary decidis pli forte ofendi la mariston, ke li unue kun ŝi batalu. Kiam la fianĉo de Mary, kies nomo restas nekonata, venis por la duelo, lia rivalo jam estis morta.

Mary tamen ne sukcesis realigi sian revon. Calico Jack kaj Anne, dezirante ekhavi pli multe da valoraĵoj, komencis ataki ĉiun ŝipon, kiun ili renkontis, eĉ la komercajn ŝipojn de Jamajko. En 1721 la insulestro decidis haltigi tion. Calico Jack kaj lia ŝipanaro estis kaptitaj. La atako venis neatendite, kiam preskaŭ ĉiuj piratoj estis ebria. Forte defendis sin nur du piratoj, kiuj damnis siajn kamaradojn, kiuj lasis ilin je la malfeliĉo — ili estis Mary kaj Anne. Kondamninte la tutan ŝipanaron al morto la juĝisto demandis la kaptitojn, ĉu ezistas iu kaŭzo kontraŭ la plenumo de la puno. Ambaŭ virinoj asertis, ke


ili estas gravedaj, kion kuracisto konfirmis, kaj la mortopuno estis anstataŭigita per malliberiĝo. Kiam antaŭ la ekzekuto oni venigis Calico Jack ĉe Anne, ŝi diris al li: "Mi bedaŭras vidi vin ĉi tie. Sed se vi batalus kiel homo, ili ne pendumus* vin kiel hundon!"

Anne naskis la infanon kaj jaron poste ŝi jam estis libera. Oni diris, ke amikoj de ŝia patro liberigis ŝin kaj transportis ŝin hejmen. Pri ŝi oni nenion plu aŭdis.

Mary Read ne vidis sian infanon. En la malliberejo ŝi malsaniĝis kaj mortis.

Ĉi tiun nekutiman historieton pri pirataj virinoj konfirmas dokumentoj, kiujn gardas la Arkivo de Jamajko. □

(Esperantigis Zoran Ĉirić, Serbio)



La ĉeesto de virinoj sur pirata ŝipo estis plej severe malpermesita; mariston kaŝe venigintan virinon atendis mortopuno. Tamen, la historio notis inajn nomojn.

Baldaŭ post tio Calico Jack organizis ribelon kaj ekkomandis la ŝipon. Inter la ribelantoj estis unu bela junulo, kiu plaĉis al Anne. Je la unua okazo ŝi malkovris al li, ke ŝi estas ino. Sed la junulo komencis eviti ŝin, eĉ kaŝiĝi de ŝi. Batalema kiel ĉiam, Anne tuj diris, ke ŝi mortigos lin, se li ne ŝanĝos sian konduton. Li fine rekonis, ke ankaŭ li estas ino. Ŝi iĝis pli poste la fama piratino Mary Read.

Mary Read ankaŭ estis neleĝa filino. Kredante, ke tiel ŝia infano havos pli facilan vivon, la patrino prezentadis la knabinon kiel knabon. Kiam Mary iom kreskis, la patrino tuj laborigis ŝin sur ŝipo. Baldaŭ Mary fariĝis eĉ soldato, parto-



KONKURSO DE POLA RADIO PRI LITERATURO

La Esperanto-redakcio de Pola Radio organizas konkurson dediĉitan al polaj Nobel-premiitoj. Por partopreni skribu respondon al almenaŭ du el la subaj demandoj kaj sendu letere, fakse aŭ retroŝte al: Pola Radio, Esperanto-Redakcio, Poŝtfako 46, PL-00-977 Varsovio, Pollando; ☎ +48-22 645-5917; ✉ <pettyn@radio.com.pl>.

1. Jam kelkaj poloj ricevis la Nobel-premion. Menciuj almenaŭ du el ili.
2. Ĉi-jare pasas la 80-a morto-datreveno de unu el la polaj Nobel-premiitoj pri literaturo, aŭtoro de mond-fama romano pri la unuaj kristanoj, pro kiu li ĉefe ricevis la Nobel-premion kaj kiun oni plurfoje filmis. Kiel nomiĝas la verkisto? Kiel titoliĝas la romano?
3. Kiuj verkoj de polaj Nobel-premiitoj en la sfero de literaturo aperis en E-traduko? Menciuj almenaŭ unu aŭtoron kaj almenaŭ unu titolon. Ni akceptos mension de publikigoj en gazetoj (titolo de la koncernaj gazetoj), broŝuroj, libroj aŭ kasedoj.

Inter la respondintoj al ĉiuj tri demandoj ni lotumos 31-kasedan registraĵon de la plena teksto de la romano *Quo Vadis*, en la majsta traduko de Lidja Zamenhof kaj laŭtleĝo de Ksawery Jasieński, elstara parolisto de Pola Radio kaj Televido kaj esperantisto. Krome inter ĉiuj ceteraj partoprenantoj de la konkurso ni lotumos ĉ. 50 premiojn, inter kiuj E-librojn kaj -kasedojn. PARTOPRENU!

INDIVIDUAJ MEMBROJ HAVAS AVANTAĜOJN

OFERTO
Libroj kun rabato ĝis
60%!

Ekskluziva oferto de interesaj kaj valoraj libroj por ĉi-jaraj individuaj membroj de UEA: rabatoj kiuj repagas vian kotizon! Decidu mem ĉu vi deziras ricevi nur parton de via kotizo – aŭ eĉ jam tiun de 1997...

Esperanta Antologio. La plej impona kolekto de originalaj poemoj. 900p. Bindita. **60 gld. ☞ 24 gld.**

La granda Meaulnes. Romano de A. Fournier pri pura amo. 222p. **22,50 gld. ☞ 15 gld.**

Fundamenta Krestomatio. 18a eld. de la klasika legolibro de Zamenhof. 464p. Bindita. **48 gld. ☞ 24 gld.**

Winnie-la-Pu. Aventuroj de la fama urseto. Ilustrita. 173p. Bindita. **27 gld. ☞ 18 gld.**

Lingvo kaj vivo. Eseoj de Waringhien pri Esperanto. 452p. Bindita. **48 gld. ☞ 27 gld.**

Libro de amo. Erotika poemaro. 262p. **21 gld. ☞ 12 gld.**

Metodiko de la E-instruado. Baza gvidilo por instruantoj. 189p. **15 gld. ☞ 10 gld.**

Vetero kaj klimato de la mondo. Abunde ilustrita popularscienca verko. 132p. **27 gld. ☞ 18 gld.**

Jubileo. Ilustrita memorlibro pri la centjariĝo de Esperanto. 164p. **48 gld. ☞ 18 gld.**

Proverbaro Esperanta. 2630 zamenhofaj proverboj. 168p. **18 gld. ☞ 9 gld.**

Tiu ĉi oferto validas ĝis la **31a de dec. 1996.** Mendojn bv. adresi al la Libroservo de UEA, kun indiko de la kvantoj kaj titoloj dezirataj. Aldoniĝas sendokostoj je 10% (minimуме 5 gld.) kaj, por loĝantoj en EU, imposto je 6%.

“Papereto vortas lingvon”

— Alberto García Fumero, Kubo

Unu el la plej malnovaj kubaj parolturnoj por emfazi, ke io aperas oficiale surpaperigita – eĉ se temas pri okulfrapa eraro, fontas el misvortumo de afrikdevena sklavo pasintjarcenta.

La ĥolera epidemio en Havano, kiu komenciĝis en 1833, estis terura. La urbo radikale ŝanĝis sian vizaĝon: la gaja Havano ŝanĝiĝis en enorman tombejon.

Ĉiuj, kiuj povis, forlasis la ĉefurbon kaj kaŝis sin en farmbienoj. Surstrate restis nur tiuj, kiuj pro profesiaj kialoj, religiaj devoj aŭ manko de mono trovis sin katenitaj al la urbo.

La aŭtoritatuloj faris ĉion, kio estis farebla: oni trifoje tage pafadis salve per kanoj por forpeli la epidemion, fajregoj brulis en ĉiuj placoj, malpermesitaj estis kunvenoj en publikaj lokoj. Ĉiuj piedirantoj premis ĉe la nazo mantukon trempitan en vinagro aŭ kamfora solvaĵo, kiel rimedo por enspiri puran aeron.

En ĉiu domo estis mortinto. Ĉar la kadavroj estis tiel multaj, la tombejo Espada ne sufiĉis; pro tio oni improvizis

alian per enorma tranĉeo ĉe la hodiaŭa strato Calzada de Ayestarán. Tien oni haste enmetadis la kadavrojn, kune kun brulkalko, ĉar mankis tempo por religiaj



ritoj aŭ eĉ por priplori la mortintojn. Ĉaro post ĉaro portis ĉiam pli da kadavroj.

Oni surĉarigis ne nur la hejmajn mortintojn; oni ankaŭ delevis kadavrojn surstrate. Por tia laboro la aŭtoritatuloj alportis sklavojn.

lun tagon, ĉaro gvidata de afrikdevena sklavo portis sian funebran ŝarĝon al la improvizita tombejo. Dum la jam kutima vojaĝo la oldulo supozeble meditadis pri la mondaj kaj transmondaj aferoj, kiam li sentis ion moviĝeti en la ĉaro. Eble homo malpli batita de la sorto estus timinta, sed kio restas ankoraŭ nevidita por olda sklavo? Li nur jetis indiferentan rigardon kaj, surprizo! Jen unu el la mortintoj leviĝis!

Nu, ververe ne temis pri mortinto, sed nur pri drinkemulo pro eraro surĉarigita. La sklavo nur diris:

– Ne petolu...

Verŝajne la freŝa venteto nokta estis vekinta la dipsomaniulon, kiu, ankoraŭ ne bone regante siajn sentumojn, provis elĉariĝi.

– Kuŝ’, kuŝ’ tuj – estis la sola reago de la sklavo.

– Kial kuŝi? – respondis la pasaĝero, al kiu ne plaĉis tiamaniere veturi. – Ĉu hazarde mi malsanas?

– Vi ne malsana, vi mortinta...

– Ĉu mi, negro? Mi vivas!

– Negro scias nenion... Vi mortinta. Mi portas tombejon!

Kaj tombejon devis veturi la drinkemulo, ĉar la sklavo obstine

ripetadis: – Mi portas 22 mortintojn. Ĉi tie papereto. Papereto vortas lingvon*...

* “Papelito jabla lengua” (originale)

Tuj post unu kliento kies ĵus mallongigita hararo estis kombata de la barbiro, laŭvice devus sidi mi antaŭ la granda murspegulo de la barbirejo. Sed la vicoj ne ĉiam estis respektataj tiam! Subite enen paŝis virego kun ĝangalsovaĝaj hararo kaj barbo, ekstaris malantaŭ la laborseĝo de la barbiro man-tenante ĝian kapapogilon kaj ordontone demandis: “Ĉu finite?!” La barbiro, strebante malkontentigi nek lin nek min, tre mizertone respondis: “Sed tiu sinjoro alvenis pli frue”, okulmontrante je mia flanko. Samtempe la unua kliento ekstarante pagis, kaj forkuris. La virego mokridetante eksidis apud mi tuŝante mian samflankan genuon: “He he... Nu, estas via vico, ĉu?”

— Jes... sed ne... ne... jes... sed se mankas al vi la tempo, bonvolu...

— Bone, bone...! Sinjor' barbir', tiu ĉi ĝentila civilula sinjoro konfesas, ke mi venis pli frue — Kaj saltetis sur la laborseĝon.


La barbiro rigarde pardonpetis de mi kaj mi rigarde invitis lin je silentiĝo kaj eklaboro...

La haroj de la kapo, lipo kaj vizaĝo de la virego estis tiom malpuraj, interplektitaj kaj haose pelmelaj, ke la mizera barbiro ne sciis, kion fari. Do, preninte tondilon kaj ŝajnigante plenumi sian taskon, tre mallaŭte li demandis: “Kian ordigon via moŝto preferas?”

— Ordigon? Ordon? ...Ek, ek, onklo. Se mi akceptus ordon aŭ disciplinon, aŭ leĝon, mi ja vivus najbare de vi kaj aliaj kiel vi... ek, ek. Nur iom mallongigu la kapharojn ĉirkaŭ miaj oreloj, ke mi aŭdu pli klare; nur iom mallongigu la brovharojn antaŭ miaj okuloj, ke mi vidu pli klare; nur iom mallongigu miajn lipharojn, ke mi manĝu kaj trinku pli facile. Ordo, ordigo, ordemo kaj samaj vortoj estas nur por urbanoj kaj civitanoj... Rapidu, rapidu, oĉjo.

La barbiro komencis mallongigi liajn lipharojn timeme sed rapide.

Malbonŝance la tondilo tondis ie la kapharon pli profunde ol ordonite. Ho Dio, kion fari? La barbiro ekstaris sojle de ploro. Laŭ mia aludo li tuj samniveligis la tutan hararon de la kapo. Ni ambaŭ atendis la reason de la virego. Kion li faros kompreninte la aferon...? Nekredeble, vere ne-



Barbiro

— S.N. Mozaffari, Irano

kredeble li rigardante min tra la spegulo ne sovaĝtone diris: “Ĉu mi okupis vian vicon?” Kaj mi tuj neis perkape ne kapablante eldiri eĉ vorton.

— Foje ordaĵoj ne estas tiom malbonaj, sed se ili ne ofendus min...

— Jes, jes, sinjoro, vi pravas... — Kaj la barbiro komencis mallongigi la brovharojn. Ĉi-foje mi entreprenis: “La brovoj de grandsinjoro kiel vi nepre devas esti viraj, viregaj. Sed bonvolu permesi al la barbiro akordigi ilin kun la formo de via bele vira kapo...”

— Bone, urbano, mi permesas al vi sugesti — respondis la virego iom ĝentiltone. Kaj la barbiro akordigis liajn brovojn.

Tiam en tiu lando troviĝis multaj ideologioj politikaj, religiaj ktp. Kaj ĉiuj, krom siaj enhavaj formoj, havis eksterajn formojn. Iuj portis longajn lipharojn, aliaj densan barbon, triaj...

La virego daŭrigis: “Se la ordigo konsenkvenus kun ekonomia justeco, tiel ke se troviĝus pano manĝus ĉiuj kaj se ĝi mankus ĉiu tolerus la malsaton, tiam la ordigo estus bona...”

Ankoraŭ pendis longaj haroj de liaj lipoj kaj la barbiro kombe ordigis ilin por tondi...

— Sed kiu povas kredi, ke ĉiuj tolerus saman suferon? Ĉiuj estu egalaj? Ĉu Dio kreis niajn kvin fingrojn samegalaj? Ĉu homo instinkte, nature emas havi ion pli ol aliulo. Kompreneblas, ke la motivo kaj la stimulo de ĉiuj homaj strebadoj estas la inklino je pliriĉiĝo kaj plikomforto... — La lipharoj jam estis tute mallongaj kaj enkadraj.

La virego jam havis afabletajn kaj dubemajn tonon kaj rigardon. Eĉ troveblis ia ŝercemo en liaj vortoj:

— Bonvolu forrazi la harojn el mia gorgo. Ja mia edzino plendas kisi min, ha, ha...

Barbirinte lian barbon, la barbiro prenis razilon por razi liajn gorgajn harojn...

— Sed la leĝojn ne povas fari la homoj. La homoj mem estas kreitoj, ĉu kreito povas koni kreiton? Kompreneble ne. Nur la kreinto konas la kreiton. Do nur Li rajtas ordoni ordaĵojn kaj leĝojn.

Jam lia gorgo estis kisebla.

— Grandsinjoro, kie vi loĝas? — mi demandis intimece.

— En la ĝangalo. Sed kelkfoje mi pripensis aĉeti apartamenton en la urbo. Tie ĉi la vivo ŝajnas pli komforta.

— Kiam vi revenos al la urbo? — demandis la barbiro kuraĝiĝinte.

— Kial vi demandas, frato barbiro?

— demandis la virego psalmtone!

— Nur por taksi, kiam rekreskos viaj haroj.

— Post la vintro.

— Ho, tre malfrue. Do permesu al mi forrazi viajn lipharojn kaj barbon.

— Ne, ne, mi nepre malvarmumos.

— Mi ŝmiras per kremoj vian vizaĝon. Krome vi povas uzi ĉapelon kaj porti koltukon aŭ malfaldi la kolumon de via mantelo...

La virego rigardis min tra la spegulo kaj serĉis mian opinion el miaj okuloj. Mi ja ne oponis plivilizi lin:

— Donacu pli vastan kisebenon al via edzino... — kaj ni tri ridis amike.

La barbiro (jam razisto) ekrazis la harojn de la lipo kaj vizaĝo de la ekssovaĝa virego.

Sed li ne ĉesigis la paroladon: “Estas juste, ke ni por vivi unu apud la alia bezonas leĝojn — ĝuste la senordaj socioj, kiel la pelmelaj haroj, baras homan komforton; kaj estas juste, ke Dio pli rajtas fari leĝojn ol ni — nur Li revelaciis la leĝojn... Sed li ne parolis pri ĉiuj detaloj kaj ĉiuj flankoj de la hodiaŭa tera homara vivo. Ni devas obei plivilizitojn. Ankaŭ ni rajtas fari leĝojn homajn, kie leĝoj diaj silentas kaj respekti homajn leĝojn, respekti homajn rajtojn...”



Vekinte min el mia dolĉa dormeto, la virego intencis adiaŭi.

Tre ĝentile li pagis, tre ĝentile li pardonpetis pri sia eksa konduto, tre ĝentile li mandonis kun ni kaj tre ĝentile foriris...

Jam estis mia vico. Mi sidis sur la seĝo antaŭ la murspegulo. La barbiro tre ĝentile demandis min:

— Kian ordigon vi preferas?

— La usonan — tre ĝentile mi respondis. □

La naiva koalo

— Robert Roze, Francio

La koalo, mamulo el orienta Aŭstralio, estas sendube natura kuriozaĵo.

Tiu eta kaj sendanĝera besto, kiu trankvile surgrimpas la altajn eŭkaliptojn por pluki sian nutraĵon kun la ido surdorse, estas tre kortuŝa bildo, kiun de kelkaj jaroj oni povas vidi en diversaj reklamoj por alvoki al la protektado de tiu specio endanĝerigita de la aŭstraliaj hakistoj, sed ankaŭ kiel simbolon de senmalica fido miksitita kun naiva riskemo, ĉar tiuj afablaj bestoj ne timas vertiĝon, kiam ili grimpas ĝis 150 metroj alte, laŭlonge de la eŭkaliptaj trunkoj.

La koalojn oni delonge rigardis kiel ursedojn kvankam ili nepre apartenas al la marsupiuloj, kiel la kanguruoj. Fakte ankaŭ la koalinoj posedas ventran poŝon sed ĝi malfermiĝas inverse al tiu de la aliaj marsupiuloj.

Kiel la kanguruino, la koalino post 35 tagoj naskas idon, kiu longas 19mm kaj pezas 5,5 gramojn. Dum 6 monatoj la koalido kreskas en tiu rifuĝejo, el kiu ĝi eliras nur kiam ĝi akiris taŭgan felan veston.

Kvankam nuntempe estas strikte malpermesite ĉasi koalojn, granda danĝero fare de la aŭstraliaj terkultivistoj minacas la beston per la detruado de la eŭkaliptaj arboj, kie vivas la koaloj kaj de kies folioj plene dependas la koaloj por sin nutri. Kvankam tiuj folioj entenas cianidan acidon, kiu estas fortega veneno por ĉiuj vivestaĵoj, ili estas sendanĝeraj por la koalo, kiu kiel perfekta “kemiisto” kapablas elekti laŭ la sezonoj la foliojn en kiuj la denseco de veneno estas malpli granda. Ili plie posedas propran kuracajn laborejojn, kiu troviĝas en ĝia longa cekumo, ĉirkaŭ 8 metrojn longa, kiu fariĝas ideala fermentujo, dank’ al la malrapida trairado de la folioj.

Specialaj bakterioj, kiuj vivas en tiu poŝo, detruas grandan parton de la nocivaĵoj entenataj en la manĝaĵo.

Tuj kiam la koalido ne plu bezonas mamsuĉi, ĝia patrino mem preparas la unuajn foliajn kaĉojn, al kiuj ĝi aldonas etan kvanton de sia propra fekaĵo. Tiuj specialaj manĝoj, kiuj entenas malgrandajn kvantojn da veneno, agas kiel vakcinoj, kiuj imunigas la bebkon kontraŭ diversaj malsanoj.

Estas nepre necese, ke la aŭstralia aŭtoritatularo protektu la koalojn kontraŭ la krimuloj, kiuj ĉasas ilin pro ilia felo kaj detruas la eŭkaliptajn arbarojn, kiuj balzamas kaj sanigas la atmosferon. □



**La Adelajda UK proksimiĝas...
...per kanguruaj salto!**

**Atende al Adelajdo, plibeligu viajn
korespondaĵojn per la glumarko de
la 82-a Universala Kongreso!**

Diametro 36mm. Flavo, grizo kaj verdo sur blua fono. Folio de 10 glumarkoj: 3,00 gld. Triona rabato ekde triobla kvanto.



Kial vir-hundoj levas malantaŭan kruron por urini?

facila

Sok Samnang, Kamboĝo

Antaŭ tre longa tempo en iu vilaĝo vivis amaljunaĝedzoj. Ili havis neniun infanon kaj estis tre malriĉaj. Ili tre volis oferi* ion al la bonzoj*, sed havis nenion.

Iutage la maljunulino diris al sia edzo: "Nun niaj najbaroj* rikoltas* sian rizon. Se ni irus al iliaj kampoj kaj kolektus la reston, eble ni havus sufiĉe da rizo por fari donaceton al la bonzoj." La edzo aŭskultis tre ĝoje kaj akceptis tuj. Fine ankaŭ ili povos porti rizon al la pagodo*!

La bonz-estro antaŭsentis ilian alvenon. Li ordonis al ĉiuj bonzoj atendi la geedzojn antaŭ la pagodo. Fine ili alvenis sed la bonzoj trovis malmulte da manĝaĵo, sekve ili tre malĝojis kaj mez-ranga bonzo diris al la geedzoj: "Ĉar vi havas nur tiom malmulte da manĝaĵo, bonvolu porti ĝin al alia pagodo — ne ĝenu nin."

Kiam la du kompatindaj kredantoj aŭdis tiujn vortojn, ili tre malfeliĉis kaj revenis hejmen.

Kelkan tempon poste, la maljunulino proponis al sia edzo alian ideon: "Mi vidas multe da vir-hundoj, kiuj vagas* sur la vojo ĉirkaŭ nia domo. Se ni kaptus ilin kaj farus manĝaĵon el ili kaj denove oferus al la bonzoj, certe tio plaĉus al ili."

Aŭskultinte la diron de sia edzino, la viro forte konsentis kaj tuj prenis bastonon* por mortigi virhundojn. Poste ili faris tre multe da manĝaĵo per virhunda viando. Kiam ĉio estis preta, ili portis ĝin al la pagodo.

La bonzestro jam antaŭsentis ilian alproksimiĝon kaj ordonis al ĉiuj bonzoj atendi antaŭ la pagodo same kiel antaŭe. La bonzestro ordonis, ke la tuta ofero de la geedzoj estu portata al li. Unu manĝema bonzo, tamen, kaŝis ujon da manĝaĵo.

Jam antaŭe la bonzestro sentis, ke la tuta ofero estas virhundaĵo; li decidis uzi sian magion* por revivigi la virhundojn. Subite la manĝaĵo iĝis denove vivantaj virhundoj. Ili tamen havis nur tri krurojn, mankis unu malantaŭa! Vidante tion, la bonzestro sciis certe, ke iu bonzo ne alportis la manĝaĵon. Li ordonis, ke oni serĉu ĝin ĉie. Fine, iu alportis ĝin kaj li ree magiis. Subite la virhundoj rehavis la tutan kruraron.

Ekde tiu tempo, virhundoj urinas* levante unu malantaŭan kruron por memori la bonan agon, kiun la bonzestro tiam faris al ili.

bastono: longa, maldika peco da ligno

bonzo: budhista *pastro* (*pastro:* homo, kiu gvidas religian servon)

magio: supernatura povo fari mirindajn aferojn

najbaro: homo, kiu loĝas apude

oferi: donaci al diaĵo ion por kontentigi ĝin

pagodo: azia konstruaĵo por servi dion aŭ diinon

rikolti: de-tranĉi kaj amasigi grenon, herbon

urini: maltrinki

vagi: iri de unu loko en alian sen fari ion vere



tentaklo

Viaj reagoj kaj sugestoj estas bonvenaj ĉe nia adreso. La redakcio ne respondecas pri la opinioj de la legantoj.

La plej malnova krimo

La kontraŭreago de mia samlandano pri kaŝaj societoj en Niĝerio (*KONTAKTO* 152, 1996:2) tiklas min. Mi trovos tempon por kontraŭpezi kelkajn el liaj antaŭjuĝoj. Sed nun pri *La plej malnova krimo de la mondo* (*KONTAKTO* 151, 1996:1):

Argumenti, ke "Prostituado... esta pure kaj simple ago de perforto, la pinta esprimo de socio regata de viroj..." bedaŭrinde nur malkaŝas la mensan malprofundecon de niaj hodiaŭaj patrinoj. Ĉiu honesta homo scias, ke de kiam Adamo (laŭ la kristana mitologio) cedis la iniciaton al Eva en Edeno, ĉiu afero en la mondo, ĝis nun, estas en la firma, nedeprenebla tenego kaj rego de virinoj. Sed mia reago ne temas pri tio, kiu bezonas liberon — ĉu viroj aŭ virinoj (eble *KONTAKTO* iam provizos forumon por diskuti tiun ĉi temon). Mi nur volas surpaperigi miajn pensojn leginte en *KONTAKTO* pri la tiel nomata plej malnova plago de la homaro.

Viro vizitadas la "ruĝlampajn kvartalojn", ĉar li scias, ke li trovos virinon, kaj la virino troviĝas tie, ĉar ŝi scias, ke viro ja venos. Ambaŭ do — kaj la viro kaj la virino — estas kaptitaj en bedaŭra destino de malvirto kaj malmoraleco. Ili estas samtempe kaj rabantoj kaj viktimoj de permesema kaj hipokrita socio.

La afero tiom seriozas kaj kortuŝas, ke ĝi bezonas pli ol kompaton kaj nomaĉadon. Ne gravas, kiom da konferencoj ni aranĝos jare pri prostituado, ni nur diskutos la problemon sed tamen evitos la solvon. La solvo radikas profunde en la koro de la individuo — via kaj mia.

Ĉiu prostituitino, narkotulo kaj krimulo havas patron kaj patrinojn; li aŭ ŝi devenas de iu aŭ alia familio. Sed en mondo, kie ĉiutage oni oferas sur la altaro de feministaj egoismo kaj parokismo la bazan

unuon de la socio, estas stulta infanaĵo atendi, ke la socio povas esti pli bona. Ne eblas! Do se ni kunvenas en Seulo aŭ ie aliloke kaj plendas pri prostituado ktp, ni similas al la viro, kiu alportis formikoplagitajn branĉofaskojn en sian domon kaj poste trairadis la vilaĝon plendante, ke li ne komprenas, kial lacertoj vizitadas lin. En tiu ĉi mondo estas tiel, ke ni ĉiam rikoltas, kion ni semas.

Do ni devas reiri al la fundamentoj. Jes, ni devas kuraĝe diri al tiuj kiuj grimpas Evereston por kondamni socion "regatan de viroj", ke ankoraŭ amo, humileco kaj obeemo estas ĉi-mondaj virtoj — tre necesaj virinaj trajtoj.

Jen poemo mia aperinta en *LA AFRIKA RETO* n-ro 5 (februaro 1993) pri la temo:

Vizitanto

Vizitanto
Ŝin vi vidas
Okuloj delogaj
Ŝin vi vidas
Lipoj plenruĝaj
Ŝin vi vidas
Koksoj ŝanceliĝantaj.

Vizitanto
Bonetu kun ŝi
Ne devas hasti
Via kondamno.
Vian simpation
Ŝi tamen ne bezonas
Ĉar viktimoj ni estas.

Vizitanto
Tial memoru
Tie ŝi eksteras
Kie lampoj ruĝas
Vestita en provoko
L'esenco de tentado
Ĉar scias ŝi
— Ĉiam venas vi.

Cetere mi gratulas vin pro via ĉarma laboro ĉe la redaktejo de nia altkvalita gazeto *KONTAKTO*!

Mralipor Udu, Niĝerio

Kun viaj kontribuajoj sendu, se eble, ankaŭ ilustran materialon — tio multe helpas nin. Antaŭdankon!

Foto

La foto de Irina Aleksejeva en *KONTAKTO* n-ro 153 (1996:3) estas admirenda ĉarma. Espereble en la koncerna rubriko ni vidos aliajn gekontaktistojn. La popolo ekkonu siajn heroojn!

Mihail Ŝelestov, Bjelorusio

Pri *KONTAKTO*

Mi ĝojis ricevi *KONTAKTO*-n, kiu multe plaĉas al mi; kore mi dankas pro la sendo de tiu grava revuo. Mi fiero montris ĝin al aliaj geknaboj esperantistoj de nia grupo. La instruisto igis nin legi artikolojn de *KONTAKTO* por praktiki legadon.

Maykel González, Kubo

Mi volas gratuli la redakcion kaj la kunlaborantojn de *KONTAKTO*, ĉar vere, via gazeto estas tre (eble la plej) interesa!

Pierre Bouvier, Francio

Miaopinie *KONTAKTO* estas reale kontaktilo por la tuta homaro, por scii kaj koni plu pri aliaj popoloj kaj iliaj socikulturaj fonoj — speciale tiuj el la Tria Mondo. Ĝi donas ŝancon al la homoj esprimi siajn opiniojn kaj utiligi sian verkan talenton. Ĝi efektive atingis la celon pritrakti "tiujn problemojn, kulturajn kaj sociajn, kiuj tuŝas la junularon, kaj tiujn apartajn interesojn kiujn havas gejunuloj", kiel oni legas en la enkonduko de la unua numero de la gazeto, en 1963. Gratulegon, *KONTAKTO*!

Adebáyó Afoláranmí, Niĝerio

Enigmaj

Laŭ mi la dua helpindiko de la enigma *Prelegvojaĝo* (*KONTAKTO* 154, 1996:4) estas iom neĝusta kaj povas kaŭzi miskomprenojn: ja ni povas kompreni ĝin tiel, ke preleginte pri propedeŭtiko Sabina ne dormis en la urbo, kie okazis la prelego. Sed fine mi decidis sekvi la logikon: prelego kaj tranokto okazadis en unu urbo ĉiam.

Mihail Ŝelestov, Bjelorusio

Kial ĉe la krucvorto de *KONTAKTO* n-ro 153 (1996:3) ne estas indiko "facila"? Ĉu nur pro tio, ke la vortoj forestas en la vortolisto de *KONTAKTO*? Tamen, se oni bezonas nur 5 minutojn por solvi la enigmon, ĉu ĝi ne estas facila?

Dankon pro ankoraŭ unu interesa enigma de Anna!

Espereble Sabina iam atingos ankaŭ nian regionon. Mi atendas ŝin kaj la sekvan *KONTAKTO*-n.

Oĉjo, Bjelorusio

Red.: La indikoj facila kaj tre facila rilatas ekskluzive al la lingvonivelo. Ĉu iu enigma estas facile solvebla aŭ ne, eltrovu la legantoj mem.

Per la solvado de la enigmoj de *KONTAKTO* mi akiras novajn vortojn. N.J. Andriatsarafara, Madagaskaro

Facila

Mi tre ĝuis la plene facilan numeron (152, 1996:2) de *KONTAKTO*!

Awe Babatunde Olabode, Niĝerio

Bedaŭrinde

Bedaŭrinde venontjare mi ne povos ricevadi vian altkvalitan gazeton pro tro alta prezo por mia lando. Tamen, mi deziras al vi multajn interesajn artikolojn, por ke *KONTAKTO* estu eĉ pli alloga, ĉar ĝi estas bonega reklamilo por nia amata lingvo. Kiam mi legas nian gazeton *KONTAKTO* ĉiuj antaŭjuĝoj pri malperfekta Esperanto ŝajnas al mi tute sensencaj. Do, ĉion bonan, karaj gekontaktistoj!

Pavol Petrik, Slovakio

Misnomita profeto?

Ekde tiu ĉi jaro mi aliĝis al la legantoj de *KONTAKTO*, kiun mi akiras per IREJO. La gazeto tre plaĉas al mi. Estas tre saĝe publikigi artikolojn en la niveloj *facila kaj tre facila* — tio faciligas la legadon por komencantoj. Tamen laŭ mia opinio *KONTAKTO* havas grandan mankon: novaĵoj. Mi scias, ke *KONTAKTO* ne estas novaĵgazeto kaj ankaŭ scias, ke en *TEJO TUTMONDE* aperas novaĵoj kaj raportoj. Tamen pli bone estus, se ankaŭ en *KONTAKTO* aperus almenaŭ unu paĝo da novaĵoj.

En la filmrecenzo de Irina Aleksejeva en *KONTAKTO* 152 (1996:2) p. 14 ĉe la gloso de la vorto "islamano" vi mencias la nomon "Mohameto". Mi ja miras, kiel oni ŝanĝas nomojn. "Mahometo" ne estas ĝusta. La ĝusta kaj originala nomo de la islama profeto estas *Mohammad*. Bedaŭrinde eĉ Italo Chiussi, tradukinto de *La Nobla Korano*, uzis malĝustan formon.

Ali Asghar Kousari, Irano

Red.: Se vi celas movadajn novaĵojn, tiajn ni ne aperigas ĉar,



Ĉu *KONTAKTO* plaĉas al vi?

Se jes, ne kontentiĝu legi la ekzempleron de via klubo aŭ instruisto — abonu ĝin mem! Se vi estas kurs-vidanto, faru kolektivan abonon kun 20% rabato por via lernantaro (sufiĉas nur 6 ricevantoj). Se ni sendas ĉiujn ekzemplerojn en unu pako al unu

adreso, la rabato estas 40%! Kaj, se temas pri grandaj kvantoj, ni povas interkonsenti eĉ pri pli favoraj rabatoj! Skribu al ni!

ABONTARIFO 1997

| | | | | | |
|-----------|--------------|----------|--------------|-------------|--------------|
| Aŭstralio | 28 dolaroj | Francio | 120 frankoj | Nederlando | 38 guldenoj |
| Aŭstrio | 240 ŝilingoj | Germanio | 34 markoj | Norvegio | 140 kronoj |
| Belgio | 700 frankoj | Hispanio | 2100 pesetoj | Pollando | 20 guldenoj |
| Brazilo | 20 guldenoj | Israelo | 29 guldenoj | Portugallio | 2400 eskudoj |
| Britio | 15 pundoj | Italio | 31000 lirej | Svedio | 150 kronoj |
| Danio | 130 kronoj | Japanio | 2600 enoj | Svislando | 28 frankoj |
| Finnlando | 100 markoj | Kanado | 29 dolaroj | Usono | 22 dolaroj |

kiel vi prave mencias, jam *TEJO TUTMONDE* tion faras.

PIV registras du nomojn por la profeto de Alaho: Mohamedo kaj Mahometo; la unua pli proksimas al via prefero, sed la dua estas pli disvastiĝinta en Esperantujo.

Meduzoj

Reage al la artikolo de Robert Roze en *KONTAKTO* 154 (1996:4) mi ŝatus atentigi, ke kvankam certe meduzoj ekaperis antaŭ 700 milionoj da jaroj, la surtera vivo komenciĝis jam antaŭ 3,6 miliardoj da jaroj (aŭ eĉ eble pli frue)! Do, preferu ne nomi meduzojn unu el "la unuaj vivestaĵoj"... Cetere mi miras, ke eblis artikoli sufiĉe longe pri meduzoj sen menciigi koralojn kaj aliajn konatajn kaj fascinajn knidulojn kaj ties mirindan polipmeduzan vivciklon.

António Martins, Portugalio

Maltrafo

Domaĝe, ke mi ne trafis la kunvenon de *KONTAKTO*-legantoj dum la UK en Prago. Pli ĝuste mi ja venis al ĝi, sed poste evidentiĝis, ke la kunveno ial okazis ne en la salono, kie ĝi devis okazi. Do, mi kaj ankoraŭ kvar gejunuloj babilis en la malplena salono.

Mihail Ŝelestov, Bjelorusio

Red.: Nur en la tago post la kunsido de *KONTAKTO*-legantoj mi malkovris, ke ni estis kolektiĝintaj en ia "antaŭsalono" Pumpri. La tre labirinta kongresejo kaj ne tro efika indiko de salonoj multe malhelpis la kongresanojn. Por eviti tiajn situaciojn mi estis sterninta surplanke ĉirkaŭ ni, atentocelere, numerojn de *KONTAKTO* tiel ke ĉiuj, kiuj preterpasis nian kunsidon povis rimarki nin. Tamen, estis pli ol unu aliro al salono Pumpri!

Post la Olimpiaj Ludoj...

Kontraŭreage al *Post la Olimpiaj Ludoj* mia opinio pri paco ŝanĝiĝis en *KONTAKTO* 154 (1996:4) mi devas diri, ke s-ro Awe Babatunde O. estas simple maljusta kaj lasas sin facile influi. Oni ne rajtas ĝeneraliĝi la aferojn. Ankaŭ mi kondamnas vandalismon. Se kelkaj homoj faras tion, ili kulpas kaj la justico zorgos pri ili. Sed aserti, ke Brazilo estas rasisma lando, estas simple stulte kaj montras, ke la opinianto konas nenion pri mia lando. Ĉu li eble ne rimarkis, kiom da nigrujoj kaj duonnigrujoj ludas en la brazila teamo? Kaj certe li ne scias, ke proksimume 50% de la brazila popolo konsideras sin nigra, se ne paroli pri duonnigrujoj. Certe li ankaŭ ne scias, ke la plej konata reklambildo de Brazilo eksterlande estas mulatinoj. Ha! Estas ankaŭ nigrujoj politikistoj, artistoj tutmonde famaj, intelektuloj, altrangaj militistoj, manaĝeroj de grandaj entreprenoj k.a.

Argentinon mi konas kaj havas geamikojn tie, kiuj ankaŭ ne ŝatis, kion la gazetaro diris pri Niĝerio. Tie bedaŭrinde okazas, ke estas ankaŭ bulvardaj sportrevuoj, kies ĵurnalistoj havas kiel taskon aĉigi la emociojn de la sportfanatikuloj.

Ankaŭ pri Brazilo ili skribas teruraĵojn, kiam la teamoj de ambaŭ landoj ludas, sed ne pro tio mi komencas diri al la tuta mondo, ke argentinanoj estas tio aŭ alio.

La landoj kun longa tradicio en internaciaj sportkonkursoj (ne nur futbalaj) scias, ke tiaj fiagoj estas, bedaŭrinde, "normala" parto de la ludo. Al mi tamen ŝajnas, ke Awe Babatunde havas minuskomplekson pri sia koloro. Brazilaj nigrujoj ne havas ĝin.

Clay Magalhães, Brazilo

facila

Ŝpini la tempon

— Teksto kaj foto de
Nicolae Macovei, Rumanio

En-volitaj en la plensilento de la monto travivas la lastajn jarojn de la vivo maljunuloj mult-jardekaj. Kiel pasigi al si la tempon? Per zorgado de siaj kelkaj bovinoj kaj ŝafoj, per la havigo de la manĝaĵoj por si kaj la dombestoj. La tempon ili kalkulas laŭ la festo-tagoj de la religia kalendaro. Ankaŭ la leteroj ricevitaj de la gefiloj helpas diversigi la tempon. Plurajn infanojn havis ili — disigite ĉiuj en diversajn urbojn por perlabori la vivon. Ili ne volas eĉ aŭdi pri la hejmvilaĝo. Kelkaj vivas en Aŭstrio. Kian vivon en tiu ĉi solejo? La aŭtobuso ne ruliĝas al la vilaĝo. Nur piede la vojoj ireblas. Malsupreniri kaj supreniri la mont-flankojn — ĉu oni vizitas la lernejon ĉu oni iras al la vendejoj. Nur la maŝino portanta la korespondaĵojn ligas la vilaĝon kun la mondo. Malfacile oni perlaboras la monon. Kiel do la maljunuloj? Eĉ la plej necesaj aĉetaĵoj estas afero de mono: pano, sukero, oleo. Onjo* 74-jara devas plue ŝpini*. La vilaĝaninoj donas al ŝi lano* por fari fadenon. Necesa en la farado de vestaĵoj vintraj. La ilo per kiu ŝi pene laboras la fadenon maloftiĝis en la vilaĝoj. Oni jam serĉas ĝin por muzeoj. La maljunulino restas ekster la tempo kun sia priokupo. La laboroj kaj la formoj de la monto difinis la limojn de ŝia korpo. La silento de la naturo kaj la bestoj transdonis al ŝi la silentan sin-tenon. La malrapida ruliĝo de la okazaĵoj kutimigis ŝin atendi longe... Sed la tempo ne plu estas kompatema. La vivo fariĝis multekosta. La maljunuloj plie deflankiĝis de la mondaj travivaĵoj. Kiel ĉie en la mondo ili solas, kvankam multis iam la infanoj. Ŝangiĝis la vivpostuloj sed ne la vivkondiĉoj. Plu restas en la montaj vilaĝoj de Rumanio la malnovaj rimedoj, iloj, metodoj, praktikoj.

lano: fadenoj ĉefe el haroj de ŝafo,
el kiuj oni faras varmajn vestaĵojn
onjo: pli bela, varma vorto por onkino
ŝpini: fari fadenon